

Bankroto minacas la Esperanto-movadon.

[La pasantaj knabinoj tute ne atentis la montrofenestron, plenan de Esperanto-materialoj en la centra oficejo de UEA en Roterdamo, kiun oni eble devus rezigni. Fotis Arie Kievit.]

‘Bankroto’ estas la Esperantovorto. La bankroto ankoraŭ ne realiĝis, sed la Esperanto-movado baraktas kun financaj problemoj. Tiuj estas tiel seriozaj, ke ili eble devus rezigni la centran oficejon en Roterdamo.

Willem Schoonen la 21an de julio 2019, je 19:10

“Estas financaj problemoj, sed ne temas pri bankroto. Ni konsideros la eblojn por solvi la problemojn,” diras Martin Schäffer, la ĝenerala sekretario de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

La Esperanto-movado ĉi-semajne kunvenas en Lahtio, Finnlando. Tie elektiĝu nova estraro kaj eble ekaperos novaj indikoj por tiu estraro, kie serĉi por solvi la problemojn. Unu el la ebloj, konfirmas Schäffer, estas forlasi Roterdamon kaj establi oficejon en malpli multekosta loko.

Bonega biblioteko

UEA loĝas en Roterdamo ĉe la Nieuwe Binnenweg. “Belega domo,” diras Marc van Oostendorp, kiu nun estas profesoro pri lingvistiko en Nimego, kaj kiu naskiĝis en Roterdamo kaj lernis Esperanton estante knabo. “Mi volonte venis tie. La domo havas montrofenestron. Tie videblas aĵoj kiel Asterikso en Esperanto. Mi opiniis tion fascina. Kaj interne mi povis utiligi la bonegan bibliotekon.”

La sciigoj pri eventuala fermiĝo afliktas Van Oostendorp: “Mi lernis Esperanton ne pro ideologiaj motivoj, sed pro interesiĝo pri la lingvo. Kaj lingvo fariĝis parto de mia vivo. Se la centra oficejo devus fermiĝi pro financaj problemoj, tio ja estus bato. Kompreneble, la movado griziĝas, kaj regas dum longa tempo nostalgia sento, sed Esperanto estas lingvistike interesa. Kaj la morton de la lasta uzanto vi kaj mi ne spertos.

Duolingo

Esperanto estas travivinto inter multaj artlingvoj, kiuj iam estis kreitaj; ekde la unua dezajno de pola okulkuracisto la lingvo jam estas uzata dum pli ol 130 jaroj (vidu la kadron). Estas paradokso, diras la italo Federico Gobbo: “La Esperanto-movado estas en krizo, la nombro de membroj malkreskas. Sed oni vidas ankaŭ tion ĉe politikaj partioj. Samtempe la lingvo fariĝis multe pli alirebla per interreto.”

Gobbo estas profesoro kun speciala katedro pri Esperanto ĉe la universitato de Amsterdamo. “Miaj studentoj okupiĝas pri tiu lingvo, sed por tio ili ne devas membriĝi al la movado; ili simple povas aparteni al ĝi, do kial membriĝi? La lingvo-aplikaĵo Duolingo, per kiu oni povas lerni Esperanton, alkondukis novan printempon.”

La lingvo vivas kaj daŭre vivos, diras Gobbo: “Ĝi estas utila rimedo.” Malantaŭ Esperanto iam estis idealo por paca monda komunumo, kiu finus la distingon inter naciecoj, lingvaj komunumoj kaj religioj. Tiu ideologia ŝarĝo malkreskis, sed idealoj ankoraŭ restas, diras Gobbo: “Esperanto ĉiam estis lingvo de socia avangardo. Dum la Universala Kongreso en 1908 la Esperanto-movado komencis kiel la unua propagandi vegetarismon. Hodiaŭ estas defio utiligi mondlingvon kiel Esperanto por strebi al justa ekonomio, ĉar kapitalismo por ĉi tiu planedo ne estas daŭripova sistemo. Oni ne predikas revolucion, sed la ideo, kiel ĉiam, estas, ke Esperanto kapablas plibonigi la mondon.”

Kio estas Esperanto?

Esperanton disvolvis antaŭ pli ol 130 jaroj pola okulkuracisto kaj lingvisto Ludoviko Lazaro Zamenhof. Zamenhof, kiu estis judo, vidis la diversajn religiojn kaj lingvojn kiel la plej grandan obstaklon por mondpaco. Kun latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj kiel bazo, li dezajnis lingvon, per kiu ĉiu povas transsalti tiun hurdon. Pro tio, ke fiasko povus malhelpi lian okulkuracejon, li publikigis sian projekton por la lingvo sub pseŭdonimo: D-ro Esperanto; tiu, kiu esperas.

La Esperanto-movado pro maldekstraj idealoj suferis persekutadon en multaj landoj. La plej serioze en nazia Germanio antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito.

En la daŭro de la historio multaj artlingvoj estis kreitaj, sed neniu el ili travivis tiel longe kiel Esperanto. La taksoj pri la nombro de aktivaj uzantoj estas diversaj, sed retenemuloj taksas ĉirkaŭ 10.000 monde. La nombro de homoj, kiuj freŝdate per la lingvo-aplikaĵo Duolingo konatiĝis kun Esperanto, estas multe pli granda: 2 milionoj.

Tradukis Joost Franssen el Trouw: <https://www.trouw.nl/binnenland/bankroto-dreigt-voor-de-esperanto-beweging~b866ad50/>